UNUA DIMANĈO DE ADVENTO - 29a de novembro 2009

VIA ELAĈETO ALPROKSIMIĜAS - Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk. 21, 25 -28, 34-36

[En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj]: ”Kaj estos signoj en la suno kaj la luno kaj la steloj, kaj sur la tero mizero de nacioj, konsternitaj de la muĝado de la maro kaj la ondegoj; homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio, kio venos sur la mondon; ĉar la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos.

Kaj tiam oni vidos la Filon de homo, venantan en nubo kun potenco kaj granda gloro. Sed kiam tio komencos okazi, rigardu supren kaj levu viajn kapojn, ĉar via elaĉeto alproksimiĝas.

Sed gardu vin, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de tro satiĝo kaj ebrieco kaj zorgoj pri vivrimedoj, kaj por ke tiu tago ne venu al vi subite; ĉar kiel kaptilo ĝi venos sur ĉiujn, kiuj loĝas sur la supraĵo de la tero.

Sed viglu en ĉiu tempo, preĝante, ke prosperu al vi saviĝi de ĉio, kio okazos, kaj stari antaŭ la Filo de homo”.

Oni nomas ĝin “Bona Novaĵo”, sed efektive, legante iujn paĝojn kiel tiun kiun nun ni vidos, ĝi similas pli al minaco, al katastrofo.

Fakte en la Evangelio laŭ Sankta Luko, en la 21a ĉapitro, ĉe la versego 25°, estas skribite: ”estos signoj en la suno kaj la luno kaj la steloj, kaj sur la tero mizero de nacioj, konsternitaj de la muĝado de la maro kaj la ondegoj; homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio, kio venos sur la mondon”.

Jen, ĝi vere ŝajnas timiga mesaĝo, fakte ni vidos ke temas pri io tute mala. Jesuo estas uzanta la lingvaĵo de la profetoj, li estas citanta la profeto Joel kaj Li uzas tiujn esprimojn kiuj anoncis la alveno de la tago de la Sinjoro. Do la signoj en la suno kaj la luno – suno kaj luno estis astroj kiujn la paganuloj adore kultis kiel diaĵojn – en la steloj – per la vorto “steloj” oni indikis la estrojn, la reĝojn, la regantojn de la popolo. Jen ke estos signoj; do komencas io nova per la mesaĝo de Jesuo kiu alportos konfuzegon en la establita ordo. Jen kio maltrankviligas la homojn, ĉar okazos la disfalo de la imperioj.

La imperio estis forto kiu praktikis la dominadon super la homoj, sed ĝi donis al ili sekurecon, ĉar naskiĝinte sub iu imperio sub iu regado oni neniam opinias ke ĝi povu ŝanceliĝi aŭ fini. Do oni antaŭvidas ke la situacio tiel daŭrigu.

Tiam tio maltrankviligas la homojn, la tutan homaron. Do, kion Jesuo estas diranta estas ke, post la ruinigo de Jeruzalemo okazos sinsekvon da epokaj ŝanĝoj kaj ĉiu regado kiu kontraŭstaras la realiĝon de la Regno de Dio, tuj disfalos. Eĉ tiu kiu ŝajnas la plej potenca, eĉ la giganto havas argilajn piedojn.

Kaj Jesuo daŭrigas: ”La homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio, kio venos sur la mondon”. Por indiki la “mondon”, Li uzas la vorton “Oikuméne”, kiu indikis la loĝatan teron kaj estis esprimmaniero kiun oni uzis rilate la romian imperion. Regataj de la romia imperio, de tiu realeco tiel perfekte organizita ke ĝi sajnis devi por ĉiam ekzisti, la homoj ŝanceliĝos.

Sankta Aŭgusteno mem diris: ”se la romia imperio disfalus, tiam okazus la mondofino”. Ne okazas la mondofino, okazas la pliboniĝo de la mondo. Al ĉiu disfalo de regado respondas la kreskon de la homaro.

“La potencoj de la ĉielo, fakte, ŝanceliĝos“. La potencoj estas tiuj regadpovoj kiuj, en la ĉielo, mastras kaj regas la vivon de la homoj, laŭ iu vidpunkto. Jen, ĉio tio malaperos, ”ili ŝanceliĝos”. Kial?

“Vidos” - tiuj potencoj de la ĉielo - “La Filo de homo”, la homo kiu havas la dian kondiĉon, la homo kiu posedas la plej grandan dignon, ”venantan en nubo kun potenco kaj granda gloro”. Jen, en la momento kiam “la potencoj de la ĉielo komencas ŝanceliĝi kaj disfali, la povo kaj la gloro de la Filo de Homo leviĝas.

Do, por ĉiu reĝimo, por ĉiu povo kiu disfalas oni devas ĝoji – kaj oni devas klopodi por ke tio okazu – inaŭguriĝas la Regno de Dio, disvastiĝas la Regno de Dio. Ke la mesaĝo ne estas katastrofo sed mesaĝo plenplena je espero, tion konfirmas Jesuo..

“Kiam tio komencos okazi”, Li ne diras ”faru al vi zorgoj, teruriĝu aŭ fuĝu”, sed Jesuo diras: “rigardu supren”, do prenu la pozon de la digna homo, ”kaj levu viajn kapojn, ĉar via elaĉeto alproksimiĝas..

Do, ĉiu reĝimo kiu disfalas estas la liberigo de la homo kiu efektiviĝas. Oni ne devas malesperi kiam difinitaj povoj komencas dispeciĝi, eĉ se ili ŝajnis historiaj kaj senfinaj; tio estas la dia volo kiu efektiviĝas, ĉar la elaĉeto alproksimiĝas.

Kaj tie ĉi ni bedaŭras ke la fakuloj pri liturgio, pro ne kompreneblaj kialoj, forstrekis el tiu liturgia ero de la 29a ĝis la 33a kie estas la konfirmo je tio kion ni estas dirantaj. ”Tiel same vi”, diras Jesuo (v.31) “kiam vi vidos, ke tio okazas, tiam sciu, ke la regno de Dio estas proksima”. Do, la detruo de Jeruzalemo ne estos katastrofo ĉar ĝi, finfine, ĉesigos la sonĝojn pri restaŭrado de la Regno de Izraelo kaj ĝi permesos al la paganuloj la eniron en la Regnon, kaj, finfine estos la Regno de Dio, nome, universa regno.

Poste Jesuo avertas la disĉiplojn kaj li referencas al tio kion Li diris en la parabolo de la kvar terenoj, ĉe la ĉapitro 8. "Sed gardu vin, por ke viaj koroj ne estu ŝarĝitaj de trosatiĝo kaj ebrieco kaj zorgoj pri vivrimedoj," nome, la vivzorgoj. La zorgo, aparte tiu ekonomia, tiu pri vivtenado, ne vin deturnu el orientigo de via vivo al la bono de la aliuloj, ĉar, alikaze, poste venos al vi subite.

" Kiel kaptilo ĝi venos sur ĉiujn, kiuj loĝas sur la supraĵo de la tero". Tiel Jesuo invitas nin "Maldormu", nome "vekiĝu", viglu, "en ĉiu tempo, preĝante, por ke vi havu la forton saviĝi de ĉio, kio okazos kaj stari antaŭ la Filo de homo".

Kion Jesuo volas diri al ni? Se la disĉiploj jam integriĝis en la maljusta socio, ili alpropriigis al si la valorojn de la socio, nome la havon, la ekziston, la brilecon, la regadon: atentu ĉar ili riskos la saman sorton kiun provokos la alveno de la Filo de Homo, nome ili riskos la falon. Do tio estas invito por la kristana komunumo ne konformigi sin al tiuj ĉi malbenitaj radikoj kiuj regas la socion kaj estas: havi, leviĝi kaj regi,sed invito enmeti en sian propran vivon la sindonemon, la kundividon kaj la servo

Tiu estas la garantio ke la Regno de Dio efektiviĝas.